

“Demetu vian ĉapelon” diris la Reĝo al la atestanto.

“Ĝi ne estas mia” kontraŭdiris la Ĉapelisto.

“Do, *ŝtelita!*” ekkriis la Reĝo, turnante sin al la ĵurintoj: ĉiuj notis ke la ĉapelo estas ŝtelita.

“Mi tenas provizon da ili por vendi” la Ĉapelisto klarigis. “Propran ĉapelon mi havas neniun. Mi estas ja Ĉapelisto.”

Kaj nun la Damo almetis la okulvitrojn kaj severe rigardegis la Ĉapeliston. Sub ŝia rigardego tiu paliĝis kaj tremis.

“Vi diru vian evidencon” diris la Reĝo “Se vi persistos kondukti en tia ridinde timigita maniero, mi tuj ekzekutigos vin.”

Tiu minaco ja ne kuraĝigis la atestanton. Li senĉese ŝanĝis la sintenadon, apogante la korpon jen sur unu piedo, jen sur la alia. Kun tre maltrankvila mieno li konstante rigardis la Dameron; kaj, pro lia konfuziĝo, li eĉ elmordis grandan pecon el la tetaso anstataŭ el la buterpano!

En tiu momento Alicio havis tre kuriozan korpcenton. Kio povus esti la kaŭzo? Post ne longe ŝi konstatis ke ankoraŭ unu fojon ŝi komencas *kreski*. Unue ŝi preskaŭ decidiĝis stariĝi kaj eliri la juĝejon. Tamen post plua ripenso, ŝi opiniis ke estos pli bone resti kie ŝi nun sidas, ĝis manko da spaco devigos la eliron.

“Bonvolu ne tiel forte premi min” diris la Gliro, kiu nun troviĝis sidanta apud ŝi. “Apenaŭ mi povas spiri.”

“Pardonu, sed mi ne povas ne” Alicio respondis humile. “Mi ja kreskas.”

“Vi ne rajtas kreski tie ĉi” diris la Gliro.

“Sensencaĵo” rediris Alicio pli kuraĝe. “Ankaŭ *vi* kreskas.”

“Jes” respondis la Gliro. “Sed mi kreskas laŭ normala rapideco, kaj vi malnormale, ridinde!” Kaj kun tre malagrabra mieno li eligis sin el sia sidloko, kaj transiris al la alia flanko de l’ juĝejo. La Damo dume eĉ ne unu momenton ĉesis rigardegi la Ĉapeliston, kaj, en la momento kiam la Gliro transiras la juĝejon, ŝi diris al unu el la ĉambelanoj: “Alportu al mi la liston de la kantintoj en la lasta koncerto.” Aŭdinte tiun ordonon la Ĉapelisto tremis tra la tuta korpo tiel forte, ke ambaŭ ŝuoj fortremiĝis de la piedoj.

“Vi nur eldiru vian evidencon” ripetis kolere la Reĝo; “se ne, mi nepre ekzekutigos vin, ĉu vi estas nerve afliktata, aŭ ne.”

“Se plaĉas al via Reĝa Moŝto” la Ĉapelisto tuj komencis per tremanta voĉo —“mi estas malriĉulo—kaj apenaŭ mi komencis mian temanĝon—t.e. komencis antaŭ nur kelkaj tagoj—kaj pro la fakto ke la buterpano fariĝis tiel maldika—kaj ke la teo tvinklis tiel forte—”